WIKIPEDIA

Gvarania lingvo

La **gvarania lingvo** (gvaranie *avañe'ẽ*) estas lingvo el la Tupi-Gvarania familio. La gvarania estas nacia lingvo de Paragvajo (la hispana kaj la gvarania estas la oficialaj lingvoj). La gvarania lingvo estas parolata ankaŭ en norda Argentino, en okcidenta Bolivio kaj en suda kaj sudokcidenta Brazilo, inkluzive de la urbo San-Paŭlo de ĉirkaŭ 200 homoj en aparta kvartalo. Oni taksas, ke 6 milionoj da homoj parolas gvaranie.

Ekzistas ĉirkaŭ 4 ĝis 5 milionoj da parolantoj de la gvarania. Maksimumaj taksoj eliras de ĝis 7 milionoj, ĉe kio ankaŭ estas nombrataj personoj, kiuj havas nur malgrandetajn scipovojn de la gvarania, kio ofte okazas ekzemple ĉe la loĝantoj de urboj en Paragvajo. En Paragvajo, tial ke 90 % de la loĝantaro parolas gvaranie, la lingvo estas uzata kiel lingvo de lernado kune kun la hispana lingvo.

En diversaj lingvoj estas uzataj vortoj kiuj el hodiaŭa vorto de la gvarania lingvo estiĝis aŭ tre similas. Tiuj vortoj venas pere de la hispana kaj portugala al diversaj lingvoj, kiel la germana, sorabaj ktp., kaj devenas aŭ el dialektoj de la gvarania, kiuj estis parolitaj en Paragvajo, Argentino, Bolivio aŭ Brazilo, aŭ el tre proksime parenca Tupia, kiel ekzemple: kapibaro, jaguaro, jaguarundio, tapiro, ananaso, manioko, marako, marakujo, nanduo aŭ piranjo.

Enhavo

Historio

Dialektoj

Gvarania lingvo en Paragvajo

Skribo kaj alfabeto

Fonetiko kaj fonologio
- Vokaloj
- Konsonantoj
- Nazala sandio
- Akcento kaj eklipso

Gramatiko
- Substantivoj
- Adjektivoj

Gvarania lingvo

avañe'ẽ

Disvastiĝo de la gvarania

Brune: En Paragvajo

Ruĝe: Landoj en kiuj estas parolata la gvarania

Parolata en	Paragvajo, Argentino, Bolivio, Brazilo
Parolantoj	4 ĝis 5 milionoj
Skribo	Gvarania alfabeto (Latina alfabeto)
Lingvistika klasifiko	
Tupiaj lingvoj	
Tupi-Gvaraniaj lingvoj	
Gvarania lingvo	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Paragvajo, Bolivio
Reguligita de	Guarani Language Academy
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	gn
ISO 639-2	grn

Pronomoj
Personaj kaj posedaj pronomoj
Demonstrativaj pronomoj
Konjugacio
Unua tipo (a-/ai-verboj)
Dua tipo (che-verboj)
Persona hierarkio kaj markiloj
Negacio
Tensiaj kaj aspektaj morfemoj
Modaj morfemoj kaj verboj
Participoj
Kaŭzativo
Demandoj
Iomete pri polisintezaj trajtoj
Sintakso
Numeraloj
Morfologio
Lokaj kaj aliaj nomoj
Kelkaj vortoj el la baza vortoprovizo
Ekzempla teksto
Notoj
Literaturo
Vidu ankaŭ
Eksteraj ligiloj

ISO 639-3	grn
SIL	grn
Glottolog	tupi1282
Angla nomo	Guarani
Franca nomo	guarani

Historio

La gvarania lingvo jam estis uzata en la hispania kolonia epoko por la kristana misiigo kiel skribolingvo. La Jezuita ŝtato en la hispania kolonia epoko, kiu ĉefe ampleksis parton de la hodiaŭa orienta Paragvajo kaj la hodiaŭan argentinan provincon Misiones, favoris la gvaranian lingvon, ĉar la Jezuitoj forte limigis la almigradon de blankaj setlantoj kaj uzadis la gvaranian lingvon kiel ekskludan lingvon. En la sekulara provinco Paragvajo ĉirkaŭ Asunción kontraŭe la gvarania lingvo restis ja la dominanta ĉiutaga lingvo de la loĝantaro – ĉar la nombro de setlantoj de hispana deveno estis relative malgranda kaj tiuj miksiĝis kun la indiĝenoj – sed la oficiala lingvo tie estis eksklude la Hispana lingvo, kiu influis la parolatan gvaranian lingvon multrilate. Kun la fino de la Jezuitaj redukcioj en la jaro 1767 la gvarania lingvo perdis ankaŭ tie sian apartan pozicion.

Ankaŭ en la sendependa Paragvajo la hispana restis la unusola oficiala lingvo. La gvarania lingvo estis konsiderata ja kiel grava kultura trajto de la paragvaja nacio, sed ĝia uzado restis limigita al la buŝa uzado kaj la literaturo de ĉefe folklora karaktero.

Nur en la pli juna tempo oni komencis en Paragvajo ekuzadi la gvaranian lingvon ankaŭ en la eduka sistemo kaj kiel oficialan lingvon kaj unuecigi la diversajn uzitajn ortografiajn sistemojn al unu kiel eble plej fonetika ortografio.

Dialektoj

Libroj en la gvarania lingvo

La kun distanco plej vaste disvastiĝinta variaĵo de la gvarania lingvo estas la *paragvaja gvarania* [gug], kiu estiĝis el la lingvo de la almenaŭ parte hispane kulture asimilitaj enloĝantoj kaj de la kolonie sekulara provinco Paragvajo kaj de la Jezuita ŝtato kaj sekve montras variajn hispanajn influojn. Ĝi havas (laŭ SIL) 4,6 milionojn de kulture mestizaj parolantoj. La paragvaja gvarania estis parolata pli frue ankaŭ en la argentinaj provincoj Misiones kaj Corrientes kaj limantaj regionoj de Brazilo, sed estas forŝovita tie hodiaŭ sub la indiĝena loĝantaro grandparte de la Hispana resp. Portugala. Sekve de almigrado el Paragvajo ekzistas tamen ankaŭ hodiaŭ en Argentino kaj Brazilo granda nombro de parolantoj de la paragvaja gvarania.

La Patronia en la gvarania lingvo, en la kapelo de la Patronia en Jerusalemo

Sendepende de la Paragvaja gvarania estas parolataj de indiĝenaj grupoj, kiuj alkalkulas sin al la popolo de la Gvaranioj, nombro de variaĵoj de la gvarania, kiuj parte tre forte distingiĝas unu disde la aliaj kaj hodiaŭ plej ofte nur havas relative malgrandan nombron de parolantoj:

- Simba-Gvarania [gnw] (en Bolivio, 7.000 parolantoj laŭ SIL)
- Chiriguano/Gvarajo-Gvarania [gui] (50.000 paroantoj, el kiuj 34.000 en Bolivio kaj la resto en Argentino kaj Paragvajo)
- Mbyá-Gvarania [gun] (16.000 parolantoj, el kiuj 8.000 en Paragvajo, la resto en Brazilo kaj Argentino)

En pli vasta senco estas variaĵoj de la Gvarania ankaŭ:

- Aché aŭ Guayaqui [guq] (1.500 en Paragvajo)
- Kaiwá [kgk] (15.000 en Brazilo)
- Chiripá aŭ Ñandeva [ndh] (7.000 en Paragvajo, 5.000 en Brazilo)
- Xetá [xet] (en Brazilo, preskaŭ formortinta)

Dum ke okazas en Bolivio, Argentino kaj Brazilo kreskanta asimiliĝo de la parolantoj de ĉi tiuj variaĵoj de la gvarania lingvo al la hispana resp. portugala lingvoj, okazas en Paragvajo ĉefe asimiliĝo al la paragvaja gvarania.

Gvarania lingvo en Paragvajo

Kune kun la hispana estas la gvarania en Paragvajo oficiala lingvo. La konstitucio de 1992, per kiu la gvarania lingvo estis difinita kiel aldona oficiala lingvo, estas ja unu el la malmultaj oficialaj tekstoj, kiuj estis tradukitaj en la gvaranian lingvon.

Oficiale Paragvajo validas kiel dulingva. La realeco estas tamen pli komplika. Preskaŭ neniu parolas unu el la lingvoj en ĝia pura formo. Pli kleraj, urbaj, eŭropcentraj tavoloj parolas rioplatensan hispanan kun enmiksitaj gvaraniaj frazoj, dum ke malpli kleraj, kamparaj, kamparanaj tavoloj parolas gvaranion kun fortaj partoj de hispana vortoprovizo, kiu estas konata kiel Jopara [dʒopaˈɾa]. La lerneja edukado okazas per la hispana lingvo, sed krome la gvarania estas instruata kiel plia fako.

Laŭ la popolnombrado de 1992 en Paragvajo estas parolataj la sekvaj lingvoj:

- Gvarania: 1,6 Mio. (39,3 %)
- Gvarania kaj hispana: 2 Mio. (48,9 %)
- Hispana: 260.000 (6,4 %)

Sed devas esti atentata, ke la kompetento en ambaŭ lingvoj plej ofte ne estas la sama. Multaj homoj nomas sin dulingvaj, kvankam ili regas nur unu el la lingvoj.

Pro la kreskanta uzado de la gvarania ankaŭ en la eduka sistemo kaj kiel oficiala lingvo oni parte konsideris la fakton, ke pli ol 80 % de la paragvaja loĝantaro estas gvaranilingvaj kaj sufiĉe granda parto havas nur rudimentajn scipovojn de la hispana.

Skribo kaj alfabeto

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Gvarania alfabeto.

Kvankam la gvarania lingvo jam estis skribita antaŭ 350 jaroj je misiaj celoj, nur ekde kongreso en Montevideo en 1950[1] ĝia alfabeto estas normigita. Ĝia alfabeto estas varianto de la latina alfabeto, sed kun kelkaj diakritaj signoj.[2] Ĝi konsistas el 33 literoj, el kiuj 12 estas vokaloj kaj 31 - konsonantoj.

La ĉefa diakrita signo estas la tildo, kiu estas uzata ĉe la 6 nazalaj vokaloj *ã, ẽ, ĩ, õ, ũ, ỹ* kaj *ñ*. Krome la vokaloj *á, é, í, ó, ú, ý* estas uzataj, se la akcento de la vorto ne troviĝas sur la lasta silabo.

Fonetiko kaj fonologio

La gvarania permesas nur silabojn, kiuj konsistas el vokalo aŭ konsonanto plus vokalo; silaboj, kiuj finiĝas per konsonanto aŭ du aŭ pli da konsonantoj kune (krom "digrafoj"), ne eblas. Tio korespondas al la skemo (C)V(V).

Vokaloj

Ortografio	Prononco
a	[a̯]
e	[ɛ̯]
i	[i̯]
o	[ɔ̯]
u	[u̯]
y	[ɨ̯]

Buŝaj kaj nazaj vokaloj[1]

	Antaŭa	Centra	Malantaŭa
Alta	/i/, /ĩ/	/ɨ/, /ɨ̃/	/u/, /ũ/
Meza	/e/, /ẽ/		/o/, /õ/
Malalta		/a/, /ã/	

La *y* estas vokalo inter [i] kaj [u], kiu ankaŭ ekzistas en la pola, rusa kaj turka (tie: *ı* sen punkto). Krome ekzistas de ĉiuj 6 vokaloj ankaŭ nazalaj variaĵoj (*ã, ẽ, ĩ, õ, ũ, ỹ*). La nazalaj vokaloj estas distingivaj nur en akcentata silabo, la antaŭtonaj vokaloj nazaliĝas pro nazala asimilo antaŭ sekvaj nazalaj vokaloj aŭ nazalaj konsonantoj, en aliaj kazoj ili estas nenazale prononcataj.

Konsonantoj

Ortografio	Prononco
Nazaloj	
m	[m]
n	[n]
ñ	[ɲ]
g̃ (ankaŭ ng)	[ŋ]
Nevoĉaj plozivoj	
p	[p]
t	[t]
k	[k]
'	[ʔ] (glota halto)
Frikativoj	
v	[ʋ]
s	[s]
ch (ankaŭ x)	[ʃ]
h	[h]
Frapeto	
r	[ɾ]
Nazalo + Plozivo	
mb	[mb]
nd	[nd]
ng	[ŋg]
Alproksimanto	
j	[ɟ]
g	[ɰ]
gu	[w]

Vidu ankaŭ: Gvarania alfabeto

Nazala sandio

Pro eŭfoniaj kialoj vortoj estas grupigataj en oralajn kaj nazalajn. Vorto estas nazala, se ĝi havas almenaŭ unu el ĉi tiuj nazalaj literoj: ã - ẽ - ĩ - õ - ũ - ỹ - g̃ - m - mb - n - nd - ng - nt - ñ , kaj ĉiuj aliaj estas oralaj. Nazala vorto ricevas alian version de prefiksoj kaj postpozicioj. Ekz. la postpozicioj *pe*, *ta* fariĝas *me* resp. *nda* post nazalaj vortoj.

Ĉe tio ŝanĝiĝas /j,k,nd,mb/ al /ñ,ng,n,m/, ekz. *nde póra* „via fantomo“, *ne porã* „Vi estas bela“.[3]

Akcento kaj eklipso

La akcento troviĝas ĉefe sur la lasta silabo de la radiko, la sufikse aldonitaj gramatikaj morfemoj estas neakcentataj (enklize).

Apartaĵo estas certa maniero de la konsonanta mutacio, la *eklipso*: Multaj vortoj, kiuj komenciĝas per /t-/, ŝanĝas ĉi tiun komencan sonon, se ili dependas de aliaj vortoj aŭ estas kunmetataj kun ili:

Gvarania	Esperanto	Gvarania	Esperanto	Gvarania	Esperanto
tape	vojo	che rape	mia vojo	hape	lia/ŝia/ĝia vojo
téra	nomo	nde réra	via nomo	héra	lia/ŝia/ĝia nomo
tetyma[4]	kruro	che retyma[4] Mario retyma[4]	mia kruro kruro de Mario	hetyma[4]	lia/ŝia/ĝia kruro

La formo *tetyma* estas uzata nur, se la *kruro* estas ne posedata. Se la posedanto estas tria persono, ne estas grava aŭ estas nekonata, tiam estas uzata la formo *hetyma* post la koncerna vorto, dum ke estas uzata ĉe unua kaj dua persono aŭ antaŭe menciita persono la formo *retyma*.[4]

Ekzistas kelkaj substantivoj, kiuj ne havas /t-/ en la bazaj formoj, sed tamen havas tian ŝanĝon.

Gvarania	Esperanto	Gvarania	Esperanto	Gvarania	Esperanto
óga	domo	ñande[i] róga	nia[i] domo	hóga	lia/ŝia/ĝia domo

[i] Tio estas tiel nomata inkluda formo. Tio estas, ke alparolata persono estas inkludata. (mi+ci/vi resp. mia+cia/via)

Sed ankaŭ ekzistas kelkaj neregulaj substantivoj kun du formoj, ekz.

- túva „patro“ -> che ru „mia patro“

Ĉe verboj la uzata formo dependas de la hierarkio de la personoj (1.>2.>3.). Se verbo estas transitiva kaj la aganto (germane *Agens*) staras pli malalte en la hierarkio ol la suferanto (germane *Patiens*), tiam estas uzata la formo je r-, dum ke en ĉiuj aliaj kazoj estas uzata la formo je h-.[4] Vidu ankaŭ en la ĉapitro Persona hierarkio kaj markiloj.

- *Che ahecha ichupe.* „Mi vidas lin.“
- *Ha'e cherecha.* „Li vidas min.“

Gramatiko

En gvarania lingvo estas ne tiel forte distingataj substantivoj kaj verboj kiel en Esperanto kaj multaj eŭropaj lingvoj.

La gvarania estas forte aglutina resp. polisinteza lingvo, tio estas, oni uzas multajn afiksojn.

Substantivoj

Ne ekzistas iuj genroj en ĉi tiu lingvo. Ankaŭ difinita artikolo ne ekzistas. Anstataŭ kazoj kaj prepozicioj en gvaranio estas uzataj sufiksoj kaj postpozicioj. Distingo inter singularo kaj pluralo povas esti esprimata, sed la finaĵo por la pluralo estas malofte uzata.

La plej gravaj finaĵoj ĉe substantivoj estas la sekvaj:

- *-gua* „el (deveno)“, ekz. *ka'aguygua* „el arbaro“
- *-gui*[5] „de; el (loke); pro“; ekz. *Perugui* „de Pedro“. Ĉe pronomoj ĝi havas la formon *-hegui*, ekz. *Nde mitãve chehegui.* „Vi estas pli juna ol mi.“
  - *Ha-á ta kavaju ári gui.* „Mi falos de sur ĉevalo.“[6]

    - *Omano ñembyahýigui.* „Li mortis pro malsato.“[6]
    - *-guive* ... *-peve* (nazale *meve*, loke kaj tempe) „de ... al/ĝis“, ekz. *Aretéguive Peru hasymi.* „Ekde la festo Pedro estas malsana.“; *Jajoechapeve.* „Ĝis revido.“
- *-icha* „kiel“, ekz. *yvágaicha hovy* „blua kiel la ĉielo“
- *-ndive* „kun; per“, ekz. *Perundive* „kun Pedro“
- *-pe*[5] (nazale *-me*, loke kaj tempe) „en/sur/ĉe; al; -n (ĉe pronomoj kaj personoj)“, ekz. *ógape* „en (la) domo“, *che rógape* „en mia domo“
    - *Ame'ẽ mitãme kamby.* „Mi donas al la infano lakton.“
    - *Ahecha Perupe.* „Mi vidas Pedron.“
- *-rehe*[5], *-re* „sur, kun, tra, pro“
    - *-rehe'ỹ* „sen“
- *-rupi*[5] „tra; pro; ĉirkaŭ“ (loke kaj tempe), ekz. *Peru oguatami ka'aguýrupi* „Pedro promenetas tra arbaro.“

Krome ekzistas kelkaj postpozicioj:

- *aja*, *jave* „dum“, ekz. *Arahaku aja ha'yta jepi ypápe.* „Dum la somero mi naĝas ofte en lago.“
- *ári* „sur“ (loke), ekz. *Kalu igústo oho kavaju ári.* „Karlo ŝatas rajdi sur ĉevalo.“
- *guýpe* „sub“ (loke), ekz.
- *jerere*, *jererehe* „ĉirkaŭ“ (loke)
- *mboyve* „antaŭ“ (tempe)
- *ngotyo* „en la direkto, al“ (loke), ekz.
- *rangue* „anstataŭ“
- *rire* „post“ (tempe), ekz. *Peru ohojevy heta ára rire.* „Post longa tempo Pedro revenis.“

Normale postpozicioj staras rekte post la substantivo. Sed *guarã* „por“ estas kombinata kun la finaĵo *-pe* resp. *-ve*, ekz. *Agueru ko kamby nde mitã'ipe guarã.* „Mi alportas ĉi tiun lakton por via infano.“

Kelkaj postpozicioj fakte estas substantivoj kun la finaĵo *-pe* aŭ kun alia finaĵo, ĉe kio la sekvaj havas lokan signifon:

- *kupépe* „malantaŭ“
- *mbytépe* „meze de“ (el *mbyte* „duono; mezo“)
- *rapykuéri* „malantaŭ“ (el *tapy* „mezkarno“)
- *rendápe* „ĉe“ (el *tenda* „loko“)
- *renondépe* „antaŭ“
- *ykére*, *yképe* „apud“ (el *yke* „flanko“), ekz. *Peru oguapy che ykére.* „Pedro sidas apud mi.“

Se ili komenciĝas per *r*, ili estas derivataj de plurformaj substantivoj. Tie la formo por la tria persono komenciĝas per *h*, ekz. *hapykuéri* „malantaŭ li“.

Kelkfoje okazas eĉ kombino el finaĵo kaj postpozicio:

- *-pe/-ve ğuarã* „por“
    - *amba'apo ndéve ğuarã* „mi laboras por vi.“[7]

La finaĵo por la pluralo estas *-kuéra* (nazale *-nguéra*), ekz. *che vakakuéra* „miaj bovinoj“. Sed post numeraloj ĝi ne estas uzata, ekz. *mbohapy mbarakaja* „tri katoj“. La sufikso aperas post unu el la antaŭe menciitaj sufiksoj, ekz. *ipopekuera* „en liaj manoj“.[8]

Apartaĵo de la Gvarania estas krome, ke substantivoj povas havi estintecon kaj estontecon. Por la estonteco estas uzata la sufikso **-rã**, ekz. *che rogarã* „mia estonta domo“. Por la estinteco estas uzata la sufikso **-kue** (nazale **-ngue**), ekz. *che rogakue* „mia estinta domo“.[9],[10]

Adjektivoj

Adjektivoj ne havas kazojn, nek genrojn. Ili ofte estas uzataj kiel verboj, ĉar aparta verbo por „esti“ ne ekzistas. Tiam estas uzataj la *posesivaj* pronomoj. Ekz. *Che kyra*. „Mi estas dika.“ *Kame iporã.* „Karmeno estas bela.“

La komparado okazas per *-ve* „pli“, ekz. *Nde mitãve chehegui.* „Vi estas pli juna ol mi.“ Sed la nomita sufikso ankaŭ povas esti uzata ĉe verboj, ekz. *Arapoty iporãve.* „Printempo estas pli bela.“

Kelkaj adjektivoj havas tri formojn, ekz. *hasy* „malsana“ havas ankaŭ la formojn *tasy* kaj *rasy*. Ĉe pronomoj de la unua kaj dua personoj estas uzata la varianto je r-, ekz. *Che rasy.* „Mi estas malsana.“, dum ke ĉe pronomoj de la tria persono estas uzata la varianto je h-, ekz. *Hasy.* „Li estas malsana.“ *Peru hasy.* „Pedro estas malsana.“

Kelkaj sufiksoj povas esti uzataj kiel adjektivo.

- *-'i*: *che mitã'i* „mia malgranda infano“
- *-mi*: *nde membymi* „mia malgranda filo“, „mia malgranda filino“

Ĉe adjektivoj povas esti uzataj kelkaj sufiksoj kaj partikloj.

- *-mi* „iom, iomete“: *Che rasymi.* „Mi estas iomete malsana.“
- *-ete*, *-ite* „tre“: *Che táva imombyryete.* „Mia urbo estas tre malproksima.“
- *eterei* „tre“: *Kame hasy eterei.* „Karmeno estas tre malsana.“

Pronomoj

Personaj kaj posedaj pronomoj

La persona pronomo distingas ĉe la 1-a persono plurala („ni“) inter *inkluda* (ñande) kaj *ekskluda* (ore), depende de tio, ĉu la alparolata persono estas inkludata aŭ ne.[11]

memstare	unua	dua	tria
singularo	che	nde	ha'e
pluralo	ñande (inkluda), ore (ekskluda)	peẽ	ha'ekuéra

Por traduki la pronomojn en *dativo*, estas uzata la finaĵo *-ve* (nazale *-me*) kiel varianto de *-pe*, ekz. *chéve* „al mi“, *ndéve* „al ci/vi“, *ñandéve* „al ni ĉiuj“, *oréve* „al ni“, *peẽme* „al vi“. Sed ĉe la triaj personoj la formoj ne havas similecon kun la antaŭaj formoj de la tabelo: *ichupe* „al li; al ŝi; al ĝi“, sed en pluralo *ichupe* aŭ

ichupekuéra „al ili“. Formoj por la tria persono ankaŭ povas esti uzataj por la akuzativo, ekz. *Ahecha ichupe.* „Mi vidas lin/ŝin/ĝin.“, dum ke la akuzativo de la unuaj kaj duaj personoj estas esprimataj alie.

posesiva	unua	dua	tria
singularo	che	nde (nazala ne)	i- (hi'-, iñ-, ij-, h-)
pluralo	ñande (inkluda, nazala ñane), ore (ekskluda)	pende (nazala pene)	

La kiel posesivaj pronomoj listigitaj vortoj estas uzataj ne nur posesive, sed ankaŭ ĉe adjektivoj kaj eĉ ĉe verboj. Ĉe tio la formo de la tria persono dependas de la komenca sono de la vorto.

- *i-* estas uzata ĉe konsonantoj, ekz. *ikure* „lia/ŝia/ĝia porko“
- *hi'-* estas uzata ĉe akcentataj vokaloj, ekz. *hi'áva* „lia/ŝia/ĝia hararo“
- *ij-* estas uzata ĉe neakcentataj vokaloj, ekz. *ijajaka* „lia/ŝia/ĝia korbo“
- *iñ-* estas uzata ĉe vokaloj, se la vorto estas tiel nomata nazala vorto, ekz. *iñã* „lia/ŝia/ĝia ombro“.
- *h-* estas uzata ĉe triformaj vortoj, ekz. *hãi* „lia/ŝia/ĝia dento“ (baza formo estas *tãi* „dento“).

Sekvaj pronomoj estas uzataj nur ĉe transitivaj verboj:[12]

- La refleksiva pronomo havas la formon: *je*: *ahecha* ("Mi vidas"), *ajehecha* ("Mi vidas min")
- La reciproka pronomo havas la formon: *jo*, nazale *ño*[13]: *Peru ha Kamen ojohecha.* „Pedro kaj Karmeno vidas unu la alian.“

Krome ekzistas du tiel nomataj portmanteua-morfemoj, kiuj povas esti uzataj nur transitive.:[14]

- *ro-* - esprimas la unuan personon kiel aganton (germane *Agens*) kaj la duan personon kiel suferanton (germane *Patiens*) en singularo.
  - *Rohecha* „Mi vidas cin/vin.“
- *po-* - esprimas la unuan personon kiel aganton (germane *Agens*) kaj la duan personon kiel suferanton (germane *Patiens*) en pluralo.
  - *Pohecha* „Mi vidas vin.“

Demonstrativaj pronomoj

La Gvarania havas la sekvajn demonstrativajn pronomojn, ĉe kio en pluralo ekzistas apartaj vortoj.

Por videblaj aŭ ĉeestantaj aferoj kaj personoj estas uzataj la sekvaj vortoj:

- *ko* „ĉi tiu“
- *pe* „tiu“
- *amo* „tiu“
- *ã* „tiuj“
- *ko'ã* „tiuj“
- *umi* „tiuj“

Por neĉeestantaj aŭ nevideblaj aferoj kaj personoj estas uzataj la sekvaj vortoj:

- *upe* „ĉi tiu“
- *ku* „tiu“
- *aipo* „tiu“

La nomitaj formoj estas uzataj kune kun substantivoj, do, ili estas adjektivoj. Se ili estas uzataj kiel substantivoj, tiam aldoniĝas -*va*.

- *Mba'épa péva?* „Kio estas tio?“

Do, estiĝas la jenaj formoj, el kiuj kelkaj havas varianton sen meza v:[15]

- *kóva, kóa*
- *ko'ãva*
- *péva, péa*
- *ãva*
- *upéva, upéa*
- *amóva, amóa*
- *umíva, umía*
- *aipóva, aipóa*

Konjugacio

Gvarania havas du tipojn de verboj, kiuj havas malsamajn prefiksojn por la personoj.

Unua tipo (a-/ai-verboj)

La unua tipo (*areal*-verboj[9]) havas la prefiksojn *a*-, *re*-, *o*- (en singularo), *ja*- (nazala *ña*-), *ro*-, *pe*-, *o*- (en pluralo). Ĉe kelkaj verboj aldoniĝas -i- inter unu el la nomitaj prefiksoj kaj la radiko (*aireal*-verbo), kiel ekz. *reikuaa* „vi scias“[9][11].

Verba radiko *guata* („migri; vojaĝi“); orala verbo.

Singularo			**Pluralo**		
Persono	Prefikso		Persono	Prefikso	
1 che **Mi**	*a*-	a-guata	**1** ñande (inkl.) **Ni ĉiuj** **1** ore (ekskl.) **Ni**	*ja*- *ro*-	ja-guata ro-guata
2 nde **Ci, vi**	*re*-	re-guata	**2** peẽ **Vi**	*pe*-	pe-guata
3 ha'e **Li/ŝi/ĝi**	*o*-	o-guata	**3** ha'ekuéra **Ili**	*o*-	o-guata

Verba radiko *ñe'ẽ* („paroli“); nazala verbo.

Singularo			**Pluralo**		
Persono	Prefikso		Persono	Prefikso	
1 che	*a*-		**1** ñande (inkl.)	*ña*-	

Mi		a-ñe'ẽ	**Ni ĉiuj** **1** ore (ekskl.) **Ni**	*ro-*	ña-ñe'ẽ ro-ñe'ẽ
2 nde **Ci, vi**	*re-*	re-ñe'ẽ	**2** peẽ **Vi**	*pe-*	pe-ñe'ẽ
3 ha'e **Li/ŝi/ĝi**	*o-*	o-ñe'ẽ	**3** ha'ekuéra **Ili**	*o-*	o-ñe'ẽ

Ĉe kelkaj verboj oni aldonas -gue- inter la persona prefikso kaj la radiko. Ekz.

- *aguereko* „mi havas“
- *regueraha* „ci/vi kunprenas, kunportas“

Krome ekzistas malmultaj neregulaj verboj, nome *ho* „iri, veturi“, *ju* „veni“, *u* „manĝi, trinki“, *y'u* „trinki akvon“, *e* „diri“ kaj *yta* „naĝi“.

Dua tipo (che-verboj)

Ĉi tiu tipo (*verbos chendales*[9]) uzas la supre apud la pronomoj nomitajn personajn prefiksojn.[11] Ĉi tiuj vortoj povas esti nur parte traktataj kiel verboj, ĉar la plej multaj ankaŭ povas esti uzataj kiel adjektivoj aŭ substantivoj.

Orala verbo *japu* „mensogi“.

Persona formo	Traduko
Singularo	
che japu	mi mensogas
nde japu	ci/vi mensogas
ijapu	li/ŝi mensogas
Pluralo	
ñande japu	ni ĉiuj mensogas
ore japu	ni mensogas
pende japu	vi mensogas
ijapu (hikuái)	ili mensogas

Persona hierarkio kaj markiloj

Nordhoff nomas la prefiksojn por la *areal*aj verboj "A-Reihe" (a-serio) laŭ la vorto "aktiv" (aktiva).[16], dum ke li nomas la prefiksojn por la *chendal*aj verboj "I-Reihe" (i-serio) laŭ la vorto "inaktiv" (neaktiva).[16]

La prefiksoj de la a-serio ligiĝas al ĉiuj transitivaj reprezentantoj kaj reprezentantoj de la klaso de intencaj agoj.[16]

- *che **a**guata* „Mi kuras.“
- *che **ai**kotevẽ pirapire.* „Mi bezonas monon.“

La prefiksoj de la i-serio ligiĝas al ĉiuj netransitivaj semantikaj konceptoj. Ĉe konkretaĵoj (Nordhoff: *Konkreta*) ili montras posedon, sed ĉe abstraktaj konceptoj ili montras neagentivan partoprenon.[16]

- *che **che**pochy.* „Mi estas furioza.“
- *che **che**kyse.* „Mi havas tranĉilon.“

Ĉe transitivaj konceptoj nur eblas la neaktivaj morfemoj de la unua kaj dua personoj, dum ke la tria persono ne eblas.[16] Se la suferanto (Nordhoff: *undergoer*) estas pli alta en la persona hierarkio (1>2>3), tiam ne estas marko de la aktoro ĉe la verbo.[17]

- *Juan **che**juka.* „Juan mortigas min.“ (komparu *Che **a**juka Juan* „Mi mortigas Juanon.“)
- ***Che**su'u mbói* „Min mordis serpento.“ (laŭvorte *min-mordas serpento*, germane *MICH-beißt Schlange*)[18] (komparu ***A**isu'u ichupe.* „Mi mordas lin/ŝin.“, germane *ich beiße ihn/sie*[19])
- ***Che**jopi eiru.* „Min pikis abelo.“ (laŭvorte *min-pikas abelo*, germane *MICH-sticht Biene*)[18]

Tio eblas eĉ en pli kompleksaj frazoj:[20]

- *Ikatúpa **ore**guerujevy pyharevove?* „Ĉu vi povas reporti nin vespere?“ (laŭvorte: "ĝia-ebl'-? nin(-)-port'-denove vespero-tuj kiam", germane "SEIN-möglich-? UNS(-)-bringst-WIEDER Abend-SOBALD")
- *Ikatúpa **ore**mbohasa ambue tembe'ýpeve?* „Ĉu vi povas nin transigi al la alia bordo?“ (laŭvorte "ĝia-ebl'-? nin(-)-transig' alia bordo-ĝis", germane "SEIN-möglich-? UNS(-)-übersetzt anderes Ufer-BIS")

Negacio

La negacio estas montrata per la cirkumfikso *n(d)(V)-...-(r)i* en la Gvarania. La antaŭverba parto de la cirkumfikso estas *nd-* por oralaj radikoj kaj *n-* por nazalaj radikoj. Por la 2-a persono en singularo estas enmetata epentetika *e* antaŭ la radiko, por la 1-a persono en pluralo inkluda estas enmetata epentetika *a*. La predikato ankaŭ povas enhavi adverbon aŭ serian verbon.[21]

La postverba parto estas *-ri* por radikoj, kiuj finiĝas per *-i*, kaj *-i* por ĉiuj aliaj.

Orala verbo ***japo* (fari)**	**Nazala verbo** ***kororõ* (blekegi, rori, kriegi, muĝi [22])**	**Kun la finaĵo je "i"** ***jupi* (supreniri, eniri [23])**
Singularo		
nd-ajapó-i	n-akororõ-i	nd-ajupí-ri
nde-rejapó-i	ne-rekororõ-i	nde-rejupí-ri
nd-ojapó-i	n-okororõ-i	nd-ojupí-ri
Pluralo		
nda-jajapó-i	na-ñakororõ-i	nd-ajajupí-ri
nd-orojapó-i	n-orokororõ-i	nd-orojupí-ri
nda-pejapó-i	na-pekororõ-i	nda-pejupí-ri
nd-ojapó-i	n-okororõ-i	nd-ojupí-ri

La negacio povas esti uzata en ĉiuj tensiaj formoj, sed por la futuro aŭ ireala referenco normala tensia markilo estas anstataŭata per *mo'ã*, kio havas rezulton en *n(d)*(V)-*radiko-mo'ã-i* kiel en *Ndajapomo'ãi*, "Mi ne volas fari tion.".

Dua varianto de negacio estas tiel nomata privativa sufikso: -*ỹ*:[21]

- *yỹ* „sekego“ (laŭvorte: akvo-PRIVATIVO)
- *ama'ỹ* „seka, sekeco“ (laŭvorte: pluvo-PRIVATIVO)
- *... he'i'ỹre mba'evete vera.* „sen diri ion“, „ne dirante ion“
- *he'ỹ* „sengusta“ (*he* „bongusta“, *hete* „tre bongusta“)
- *Che kera'ỹ.* „Mi ne povas dormi.“ (laŭvorte: mia dormo-sen; germane *mein Schlaf-OHNE*[24])

Ankaŭ la negacio de la dezira formo estas kreata per ĉi tiu sufikso.

- *Tomongy'a'ỹ ore mba'e!* „Li ne malpurigu niajn aĵojn!“ (germane *Er soll unsere Sachen nicht schmutzig machen.*[25])

Tensiaj kaj aspektaj morfemoj

- -**ramo**: markas ekstreman proksimecon de la ago, ofte tradukata al "ĵus": *Oğuahe ramo che míkro.* „Mia buso ĵus alvenis.“
- -**kuri**[10]: markas la proksimon de ago. *Ha'ukuri*, "Mi antaŭ nelonge manĝis" (*ha'u* neregula unua persona singulara formo de *u*, "manĝi"). Ĝi ankaŭ povas esti uzata post la pronomo, *ha che kuri, che po'a*, "kaj kio okazis al mi, mi estis feliĉa"
- -**va'ekue**[9],[10]: eldiras fakton, kiu okazis antaŭ longa tempo kaj asertas ke ĝi estus reala vero. *Okañyva'ekue*, "li/ŝi perdiĝis antaŭ longa tempo"
- -**ra'e**: diras, ke la parolanto antaŭe havis dubojn, sed li estas certa dum la momento kiam li parolas. *Nde rejoguara'e peteĩ ta'angambyry pyahu*, "do vi finfine aĉetis novan televidilon"
- -**raka'e**: esprimas la necertecon de perfekt-aspekta fakto. *Peẽ peikoraka'e Asunción-pe*, "Mi pensas, ke vi loĝis en Asunción por momento". Tamen nuntempe la morfemo perdis iom de la signifo, havante koincidon kun *ra'e* kaj *va'ekue*

Verba formo sen la sufiksoj entute estas prezenco aŭ eĉ aoristo: *Upe ára resẽ reho mombyry*, "ĉi tiun tagon vi eliris kaj foriris"

- -**ta**[26],[27],[10]: estas futuro ĝi ankaŭ estas uzata kiel aŭtoritata imperativo. *Oujeýta ağaite*, "li/ŝi baldaŭ revenos". *Ajapóta* „Mi faros“[9]
- -**ma**[9],[28]: havas la signifon "jam". *Ajapóma*, "Jam mi faris". *Ağuahẽma* „Mi jam alvenis.“

Ĉi tiuj du sufiksoj povas esti kombinataj: *ahátama*, "Mi jam iros"

- -**va'erã**[9],[26],[27],[10]: montras ion ne proksime okazontan aŭ ion, kio devas esti farata por sociaj aŭ moralaj kaŭzoj. En ĉi tiu kazo korespondas al la germana modala verbo *sollen*. *Péa ojejapova'erã*, "tio devas esti farata"
- -**ne**[9],[26],[27],[10]: montras ion kio probable okazos aŭ ion, ĉe kio la parolanto pensas ke ĝi okazus. Ĝi korespondas certamaniere al la subjunktivo de la Hispana. *Mitãnguéra áğa oğuahéne hógape*, "la infanoj probable nun venas hejmen"

- -**hína**[28], *ína* post nazalaj vortoj: kontinua ago en la momento de la parolo, prezenso kaj pluskvamperfekto kontinua aŭ emfata. *Rojatapyhína*, "ni faras fajron"; *che ha'ehína*, "jen mi!"
- -**vo**: ĝi havas subtilan diferencon al *hína* en kio *vo* montras ne nepre kio estas farata en la momento de la parolo. *amba'apóvo*, "mi laboras (ne nepre nun)" *Oguerekovo oipotava oho.* „Kiam li havis, kion li volis, li iris.“[29]
- -**pota**: montras proksimon senpere antaŭ la starto de la proceso. *Ajukapota*, "Mi proksimas al la loko kie mi ekos mortigi". (Parta sandhi-regulo estas uzata ĉi tie: se la verboj finiĝas je "po", la sufikso ŝanĝas al *mbota*; *ajapombota*, "Mi tuj faros.")
- -**pa**, nazale -**mba**: montras emfaze ke proceso komplete finiĝis. *Amboparapa pe ogyke*, "mi komplete farbis la muron" *Hesakãmba* „Ĝi estas tute klara.“[9]

Ĉi tiu sufikso povas esti kombinata kun *ma*, rezultanta *páma*: *ñande jaikuaapáma nde remimo'ã*, "nun ni komplete scias ĉiujn viajn pensojn". Ĉi tiuj estas neakcentataj sufiksoj: *ta*, *ma*, *ne*, *vo*; tiel la akcento staras sur la lasta silabo de la verbo.

Modaj morfemoj kaj verboj

Por modoj povas esti uzataj parte sufiksoj kaj parte apartaj verboj.

- -**se**[26],[27],[30] „voli“[9]: *Akese* „Mi volas dormi.“
- -**rõ**: *Che aguatarõ, nde repurahéine.* „Se mi iras, vi kantas.“[30]
- -**nga'u** „sopiri al tio“: *Rohechanga'u.* „Mi sopiras al tio, vidi vin.“[9]
- -**gua'u** „ŝajnigi“[9]: *Oke gua'u.* „Li ŝajnigas dormi.“
- -**kuaa** „scipovi“ (Tio estas mallonga formo de la verbo *aikuaa* “scii“.): *Opurahéikuaa.* „Li scipovas kanti.“
- **te-** - esprimas deziron: *Tereğuahe porãite.* „Estu kore bonvena.“[31]
  - Ĝi reduktiĝas al simpla **t-**, se la sekva personindika morfemo komenciĝas per vokalo: *Tou pya'e pya'e.* „Li venu rapide.“[31]

Verboj de la unua tipo, kiuj estas transitivaj, povas ankaŭ havi imperativan formon. Sed la prefiksoj ekzistas nur por la duaj personoj singulara kaj plurala, nome *e*- kaj *ei*.[30]

- *ejapo* „faru“
- *eiporu* „uzu“

Plej ofte ankaŭ estas aldonata sufikso, nome -*mi*, -*na* aŭ -*ke*, kiuj ankaŭ povas esti kombinataj.[9]

- *eme'ẽmi* „bonvolu doni“
- *eguapýkena* „bonvolu sidiĝi“

Krome ekzistas kelkaj neregulaj formoj, nome *terehe* „iru“, *ere* „diru“, *he'u* „manĝu“, *hey'u* „trinku“.

Kiel modalaj verboj estas uzataj la sekvaj vortoj.

- **ikatu** „esti eble, ebli“: *Ikatúpa ha'u ko pira?* „Ĉu eblas manĝi ĉi tiun fiŝon?“
- **tekotevẽ** „devi“: *Tekotevẽ aha ko'áğa.* „Mi nun devas iri.“
  - **nakotevẽi** „ne devi“:

Participoj

En la gvarania ankaŭ ekzistas tri participoj, nome *-py*, *-pyre* kaj *-pyrã*.[29]

Kaŭzativo

Laŭ Nordhoff la kaŭzativo estas tre produktiva.[32]

- -**uka** (alomorfoj -**yka**[32] aŭ -**ka**[32], "Transitiver Kausativ"[32]) „igi + -i“ Ĝi estas uzebla nur ĉe transitivaj verboj. Kallfell nomas tion kaŭzativan aŭ faktitiva-mediativan diatezon.[33]:
  - *Ahecha**uka** ndéve.* „Mi vidigas ion al vi.“ (germane *Ich lasse dich (etwas) sehen.*)[33]
  - *Ajapo**uka*** „Mi igas fari.“[9]
  - *Ehecha**uka**mína chéve ...* „Bonvolu montri al mi ...“ (laŭvorte *!-vidi-igi-iomete-! al mi*, germane *!-sehen-lass-BISSCHEN-! mir*)[34]
- -**mbo-**, nazale **mo-** ("koaktiv"[9][35], "Intransitiver Kausativ"[32]) Ĝi estas uzebla nur ĉe netransitivaj verboj.:
  - *Che o**mo**memby.* „Mi gravedigas.“
  - *Ña Marina o**mbo**pupu la y.* „Sinjorino Marina boligas la akvon.“[6]
  - *A**mbo**jahu la mitãme.* „Mi banas la infanon.“[6]
  - *Che a**mbo**puka Isabelpe.* „Mi ridigas Isabelon.“[36] (Komparu *Isabel opuka.* „Isabelo ridas.“[36])
  - *Rodolfo che**mbo**puka.* „Rodolfo ridigas min.“[36]
  - *Erika oñe**mbo**puka.* „Erika estis ridigata.“[36]
  - Plia ekzemplo troviĝas en la ĉapitro pri polisintezaj trajtoj.

Laŭ Hammink *mbo-* funkcias ankaŭ kiel faktitivo. Ĝi originas verŝajne el la sendependa verbo *(j)apo* „fari“ kaj eble ankaŭ rilatas al la substantivo *po* „mano“.[6]

Krom la sufiĉe oftaj variantoj **mbo-** kaj **mo-** ankaŭ ekzistas **mby-** (**my-**) kaj **mbu-** (**mu-**).[35]

- *Ha amba'apo ha a**mo**kã la ry'ái.* „Kaj mi laboris kaj sekigis la ŝviton.“ (germane *Und ich habe gearbeitet und den Schweiß trocknen lassen.*)[35]

Demandoj

Demandoj povas esti kreataj per la partiklo *-pa* aŭ *piko*.

- *Ndépa aleman?* „Ĉu vi estas Germano?“
- *Reñe'ẽkuaái piko ava ñe'eme?* „Ĉu vi povas paroli la gvaranian lingvon?“

Krome ekzistas kelkaj demandaj vortoj, kiuj enhavas unu el la partikloj.

- *araka'épa* „kiam“: *Araka'épa reju?* „Kiam vi venos?“
  - *araka'e guive* „ekde kiam“: *Araka'e guive reiko ápe?* „Ekde kiam vi loĝas ĉi tie?“
  - *araka'e peve* „ĝis kiam“: *Araka'e peve remba'apo?* “Ĝis kiam vi laboras?“

- *maerãpa* „por kio“: *Maerãpa reikotevẽ ko ahoja?* „Por kio vi bezonas ĉi tiun kovraĵon?“
- *mamópa* „kie“: *Mamópa oiko nde sy?* „Kie loĝas via patrino?“
  - *mamoguápa*, *mamoyguápa* „de kie“ (deveno): *Mamoguápa nde irũ?* „De kie estas via amiko?“
  - *mamóguipa* „de kie“: *Mamóguipa ou nde irũ?* „De kie venas via amiko?“
- *mávapa* „kiu“: *Mávapa nde?* „Kiu vi estas?“
- *mba'épa* „kio“: *Mba'épa péva?* „Kio esta tio?“
  - *mba'éguipa* „kial“: *Mba'éguipa nde kyra?* „Kial vi estas dika?“
  - *mba'éichapa* „kiel“: *Mba'éichapa reiko?* „Kiel vi fartas?“
  - *mba'erãpa*, *mba'upépa* „por kio“: *Mba'erãpa reju?* „Por kio vi venis?“[37]
- *mbovýpa*, *mboýpa* „kiom“: *Mbovýpa ko pira?* „Kiom kostas ĉi tiu fiŝo?“
- *moõpa* „kie“: *Moõpa nde mbarakaja?* „Kie estas via kato?“

Iomete pri polisintezaj trajtoj

Vorto povas enhavi relative multajn informojn.[9]

- *ojetavy'o* „li/ŝi lernas“ - laŭvorte: *o-* „li, ŝi“, *je* „sin“, *tavy* „stulta , stulteco“, *-o* „sen“ (Laŭ Lustig tio estas privativo.)[9]
- *ndahepyme'ẽsei* „mi ne volas doni lian prezon, mi ne volas pagi tion“ - laŭvorte: *nda- -i* „ne-“, *a* „mi“, *hepy* (pliaj formoj estas *tepy* kaj *repy*) „prezo“, *(a)me'ẽ* „doni“, *-se* „voli“ (volitivo)[9]
- *ajepojohéi* „Mi lavas al mi (la) mano(j)n.“ - laŭvorte: *a-* „mi“, *je* „sin“, *po* „mano“, *johéi* „lavi“[7]
- *nomboguatasevéitapahina* „Ĉu li ne plu volos irigi lin?“ - laŭmorfeme n-o-mbo-guata-se-vé-i-ta-pa-hina; laŭvorte: *n-* „ne-“ (1), *o* „li“, *mbo* „-ig-“, *guata* „iri“, *se* „voli“, *vé* „plu“, „pli“, *i* „ne-“ (2), *ta* „-os“, *pa* „ĉu; ?“, *hina* „“[9][38]

Sintakso

Gvarania havas nur du verajn konjunkciojn:

- *ha* „kaj“: *Aguapy ha ha'u yva.* „Mi sidas kaj manĝas frukton.“
- *térã* „aŭ“: *Nde vare'a piko térã nde y'uhéi?* „Ĉu vi malsatas aŭ soifas?“ aŭ „Ĉu vi estas malsata aŭ soifa?“

La taskon de konjunkcioj kaj rilataj pronomoj havas sufiksoj.

- *rire* „post kiam“: *Ağuahẽ rire akarúta.* „Post kiam mi alvenis, mi manĝos.“[9]
- *-ramo* „se“: *Okýramo apytáta ógape.* „Se pluvas, tiam mi restos hejme.“[9]
- *hağua* „por -i“:[9]
  - *Aguapymi apytu'u hağua.* „Mi iomete sidiĝas, por ripozi.“[9]
  - *Aju Paraguáipe amba'apo hağua.* „Mi venas al Paragvajo por labori.“[6]
- *-va*[39]: *Péva piko míkro ohóva Paraguaýpe?* „Ĉu tio estas la buso, kiu veturas al Asunción?“
- *-ha*[39],[40] „ke“: *Cherayhuha aikuaáma.* „Ke vi amas min, mi jam scias.“
- *-gui* „ĉar“:

- *Ndokýi ojere gui yvytú.* „Ne pluvis, ĉar la vento ŝanĝiĝis.“[6]
- *-hague* „kvazaŭ“:
  - *Ambyasy chenupahague che sy.* „Mi estas malgaja kvazaŭ mia patrino batis min.“[6][41]
- *-haguére* „pro tio, ke“:
  - *Avy'a omendahatahaguére José rehe.* „Mi ĝojas pro tio ke ŝi edziniĝos al Jozé.“[6][42]

Numeraloj

Gvarania havis origine nur la numeralojn 1 ĝis 4, nome *peteĩ* „1“, *mokõi* „2“, *mbohapy* „3“ a *irundy* „4“.

Por aliaj numeraloj estis kreitaj antaŭ nelonge artefaritaj vortoj, kiuj estas apenaŭ uzataj. Ĉe tio la numeralo por 5 estas *po*, kies vera signifo estas „mano“. La numeraloj por 6 ĝis 9 estas derivitaj el tio kaj la fina parto de la bazaj numeraloj, nome *poteĩ* „6“, *pokõi* „7“, *poapy* „8“ kaj *porundy* „9“.

Por la kreado de ordaj numeraloj estas uzata la sufikso *-ha*[43], ekz. *irundyha* „kvara“.[39]

Morfologio

En la gvarania lingvo, novaj vortaj signifoj kreiĝas per kunmeto de vortoj aŭ vorteroj, kompreneble ne ekzakte kiel en Esperanto, sed en simila kvanto: ekzemple la vorto "alfabeto" aŭ "aboco" en la gvarania estas *achegety* - el tio *a*, *che* kaj *ge* estas la unuaj tri literoj de la gvarania alfabeto, kaj *ty* signifas grupon, kunmetaĵon aŭ aron. Pliaj ekzemploj kun la sufikso *-ty* (nazale *-ndy*) estas la jenaj vortoj[9]:

- *avatity* „maizejo“ (el *avati* „maizo“ kaj *-ty*)
- *petyndy* „tabaka plantejo“ (el *petỹ* „tabako“ kaj *-ndy*)
- *ñe'endy* „vortaro“ (el *ñe'ẽ* „vorto; lingvo“ kaj *-ndy*)

La polisema morfemo *-ha* uzeblas por la kreado de tiel nomataj *nomen agentis* aŭ *nomen loci*.[39]

- *Ha'e jerokyha.* „Li estas dancisto.“[39]

Sed por *nomen agentis* ankaŭ uzeblas la sufikso *-hára*.[39]

- *pohãnohára* „kuracisto“ (el *pohãno* „kuraci“)

Tiel ankaŭ kreiĝas kunmetaĵoj el du vortoj, ekzemple *mba'e guasu* signifas "mirinda" (laŭvorte: "io granda"), aŭ *tava guasu* signifas "ĉefurbo" (laŭvorte "urbo granda"). La vorto por la gvarania lingvo, *avañe'ẽ*, signifas "homa lingvo" kaj la vorto por la hispana lingvo, *karaiñe'ẽ*, havas la signifon "sinjora lingvo". Nur hezite nun pli kaj pli ekuziĝas la ekvivalentoj *guarani ñe'ẽ* kaj *epaña ñe'ẽ*. La gvarania origine nur havis numeralojn por la nombroj unu ĝis kvar[9], tial la restaj nombroj kunmetiĝas morfologie, per antaŭmeto de afiksoj, ĉe kio funkcias ekzemple *po* (kvin, vere mano) kiel bazo, kiel *po* (kvin) + *mbohapy* (tri) = *poapy* (ok). La nomoj de monatoj estas kreataj per la sama principo: *jasy* (monato) + *peteĩ* (unu) = *jasyteĩ* (januaro). Sed ankaŭ la nomoj de la semajntagoj estas kreataj laŭ ĉi tiu principo: *ára* (tago, tempo, vetero) + *peteĩ* (unu) = *arateĩ* (dimanĉo).

Lokaj kaj aliaj nomoj

En Argentino, Bolivio, Urugvajo, Paragvajo kaj Brazilo ekzistas multaj esprimoj por aĵoj sed ankaŭ loknomoj, kiuj devenas el la gvarania aŭ la proksime parenca Tupia. Tiuj estas skribataj depende de la lando laŭ la hispana aŭ portugala ortografio.

Kelkaj vortoj el la baza vortoprovizo

Esperanto	***Germana***[44],[45]	**Gvarania**[44][45]	***Esperanto***	***Germana***[44][45]	**Gvarania**[44][45]
mi	*ich*	che	*granda*	*groß*	guasu
ci, vi	*du*	nde	*malgranda*	*klein*	michĩ, mirĩ
li/ŝi/ĝi	*er/sie/es*	ha'e	*manĝi*	*essen*	u, karu
ni	*wir*	ñande, ore	*trinki*	*trinken*	u
vi	*ihr*	peẽ	*dormi*	*schlafen*	ke
ili	*sie* (pluralo)	ha'e(kuéra)	*morti*	*sterben*	mano, sapymi
kiu?	*wer?*	mávapa	*iri*	*gehen*	ha
kio?	*was?*	mba'épa	*veni*	*kommen*	ju
homo	*Mensch*	ava, yvypóra	*doni*	*geben*	me'ẽ
viro	*Mann*	kuimba'e	*preni*	*nehmen*	pyhy
virino	*Frau*	ña, kuña	*paroli*	*sprechen*	ñe'ẽ
kapo	*Kopf*	akã	*ami*	*lieben*	hayhu
okulo	*Auge*	tesa	*unu*	*eins*	peteĩ
orelo	*Ohr*	nambi	*du*	*zwei*	mokõi
nazo	*Nase*	tĩ	*tri*	*drei*	mbohapy
buŝo	*Mund*	juru	*kvar*	*vier*	irundy
dento	*Zahn*	tãi	*kvin*	*fünf*	po
lango	*Zunge*	kũ	*ses*	*sechs*	poteĩ
koro	*Herz*	ñe'ã, py'a	*sep*	*sieben*	pokõi
mano	*Hand*	po	*ok*	*acht*	poapy
piedo	*Fuß*	py	*naŭ*	*neun*	porundy
akvo	*Wasser*	y	*dek*	*zehn*	pa
fajro	*Feuer*	tata	*dudek*	*zwanzig*	mokõipa
suno	*Sonne*	kuarahy	*cent*	*hundert*	sa/sã
luno	*Mond*	jasy	*mil*	*tausend*	su

Eĉ hispanaj vortoj estas adaptataj al la gvarania lingvo[9]:

- kavaju (caballo) „ĉevalo“
- kavara (cabra) „kaprino“
- ovecha (oveja) „ŝafo“
- guéi (buey) „bovo“
- Huã (Juan) „Johano“
- aramirõ (almidón) „amelo“
- kesu (queso) „fromaĝo“
- sevói (cebolla) „cepo“

Ekzempla teksto

Artikolo 1 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en Gvarania:

Mayma yvypóra ou ko yvy ári iñapyty'yre ha eteĩcha tekoruvicharenda ha akatúape jeguerekópe; ha ikatu rupi oikuaa añetéva ha añete'yva, iporãva ha ivaíva, tekotevẽ pehenguéicha oiko oñondivekuéra.[46]

(Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus konduti unu la alian en spirito de frateco.[47])

Notoj

1. ↑ 1,0 1,1 Artikolo pri la gvarania lingvo en "languagesgulper" (http://www.languagesgulper.com/eng/Guarani.html) enhavas ĉapitrojn pri la fonologio resp. skribo kaj ortografio angle
2. ↑ Artikolo ĉe "omniglot" (http://www.omniglot.com/writing/guarani.htm) angle
3. ↑ *Nordhoff*, paĝo 22
4. ↑ 4,0 4,1 4,2 4,3 4,4 4,5 *Nordhoff: Oszillation*, paĝoj 21-22 (Sed ni uzas ĉi tie la normalan ortografion, nome sen liga streketo.)
5. ↑ 5,0 5,1 5,2 5,3 *Nordhoff: Postpositionen*, paĝoj 38-40
6. ↑ 6,0 6,1 6,2 6,3 6,4 6,5 6,6 6,7 6,8 Artikolo pri kaŭzativoj kaj kaŭzigo *Causatives and Causation: A Universal-Typological Perspecitive* (http://hamminkj.tripod.com/babel/cause.htm) angle
7. ↑ 7,0 7,1 Informoj pri Jopará (http://www.uni-mainz.de/~lustig/texte/jopara2.doc), en la ĉapitro *¿Cómo funciona el guaraní?* hispane
8. ↑ Artikolo pri Gvarania en "languagesgulper" (http://www.languagesgulper.com/eng/Guarani.html) enhavas ion pri la plurala finaĵo. Sed tie la vorto estas skribata jene: i-po-pe-kuera angle
9. ↑ 9,00 9,01 9,02 9,03 9,04 9,05 9,06 9,07 9,08 9,09 9,10 9,11 9,12 9,13 9,14 9,15 9,16 9,17 9,18 9,19 9,20 9,21 9,22 9,23 9,24 9,25 9,26 Priskribo de la lingvo (http://www.uni-mainz.de/~lustig/texte/guahispa.txt) germane (Elŝutita la 19-an de septembro 2012.)
10. ↑ 10,0 10,1 10,2 10,3 10,4 10,5 *Nordhoff: Tempus*, paĝoj 33-36
11. ↑ 11,0 11,1 11,2 *Drude: Tabelle 1: Das Formeninventar: Präfixe und Pronomen*, paĝo 5
12. ↑ *Nordhoff*, paĝo 32
13. ↑ *Nordhoff*, paĝoj 25, 32, 51
14. ↑ *Nordhoff: Portmaneaumorpheme*, paĝo 31
15. ↑ Laŭ Kallfell: Grammatik des Jopara, paĝo 250
16. ↑ 16,0 16,1 16,2 16,3 16,4 *Nordhoff: Personenmarkierung*, paĝoj 4, 30-32
17. ↑ Nordhoff. Voice in Guarani (http://www.eva.mpg.de/lingua/staff/nordhoff/pdf/VoiceInGuarani.pdf). Alirita 2012-10-22.
18. ↑ 18,0 18,1 Laŭ Kauderwelsch Band 34, paĝo 160
19. ↑ Guido Kallfell. Grammatik des Jopara. Gesprochenes Guaraní und Spanisch in Paraguay (http://miami.uni-muenster.de/servlets/DerivateServlet/Derivate-5924/diss_kallfell.pdf) (germane). Alirita 2012-09-19.
20. ↑ Laŭ Kauderwelsch Band 34, paĝo 113
21. ↑ 21,0 21,1 *Nordhoff: Negation*, paĝoj 42-43
22. ↑ germane *brüllen, dröhnen* laŭ Interaktiva trilingva vortaro (http://www.staff.uni-mainz.de/lustig/guarani/dicc/woertlok.htm)
23. ↑ germane *steigen, hochgehen, einsteigen, aufsteigen* laŭ Interaktiva trilingva vortaro (http://www.staff.uni-mainz.de/lustig/guarani/dicc/woertlok.htm), angle *go up, rise* (en la angla artikolo)
24. ↑ Laŭ Kauderwelsch Band 34, paĝo 160
25. ↑ Laŭ Kauderwelsch Band 34, paĝo 68

26. ↑ 26,0 26,1 26,2 26,3 The Paraguayan Guaraní future marker –ta (http://www.ling.ohio-state.edu/~judith/Tonhauser-TAL.pdf) (longa versio, 25 paĝoj) angle
27. ↑ 27,0 27,1 27,2 27,3 The Paraguayan Guaraní future marker –ta (http://www.ling.ohio-state.edu/~judith/tonhauser-bamberg.pdf) (mallonga versio, 8 paĝoj) angle
28. ↑ 28,0 28,1 *Nordhoff: Aspekt*, paĝoj 36-37
29. ↑ 29,0 29,1 *Nordhoff: Sonstiges*, paĝoj 44-46
30. ↑ 30,0 30,1 30,2 *Nordhoff: Modus*, paĝo 37
31. ↑ 31,0 31,1 Laŭ Kauderwelsch Band 34, paĝoj 67 kaj 68
32. ↑ 32,0 32,1 32,2 32,3 32,4 *Nordhoff: Kausativ*, paĝo 38
33. ↑ 33,0 33,1 Laŭ Kallfell: Grammatik des Jopara, paĝoj 220-222
34. ↑ Laŭ Kauderwelsch Band 34, paĝo 127
35. ↑ 35,0 35,1 35,2 Laŭ Kallfell: Grammatik des Jopara, paĝoj 216-220
36. ↑ 36,0 36,1 36,2 36,3 Artikolo pri Verba enkorpigo en kaŭzativaj konstruoj de la Gvarania *VERB INCORPORATION IN GUARANÍ CAUSATIVE CONSTRUCTIONS* (http://hamminkj.tripod.com/hamminkGNI.pdf) angle Sed ĝi tie aperas kiel *Xe a-mbo-puka Isabel-pe* (paĝo 42 [en la programo 48]) resp. *Rodolfo xe-mbo-puka* (paĝo 45 [en la programo 51])
37. ↑ Kurso de Miguel Angel Verón (http://www.sfp.gov.py/pdfs/LIBRO_GUARANI_COMUNICATIVO.pdf) hispane
38. ↑ laŭvorte angle: NEG 3SG.act CAUS walk DES more NEG FUT INT IMP; ‘Will he not want to make him walk anymore?’ VERB INCORPORATION IN GUARANÍ CAUSATIVE CONSTRUCTIONS (http://hamminkj.tripod.com/hamminkGNI.pdf), paĝo 7 angle
39. ↑ 39,0 39,1 39,2 39,3 39,4 39,5 *Nordhoff: Relativpronomen*, paĝoj 40-42
40. ↑ Atentu, ke la morfemo estas polisema.
41. ↑ Skribata iomete alie, nome per x anstataŭ per ch.: A-mbyasy xenupahague xe sy.
42. ↑ La angla traduko en la fonto estas: I'm glad she's going to marry José.
43. ↑ Atentu, ke la morfemo estas polisema.
44. ↑ 44,0 44,1 44,2 44,3 Interaktiva vortaro germana-gvarania (http://www.staff.uni-mainz.de/lustig/guarani/dicc/woertlok.htm)
45. ↑ 45,0 45,1 45,2 45,3 Wolf Lustig: *Kauderwelsch. Guaraní – Wort für Wort*. Rump, Bielefeld, 2. Auflage, 2005.
46. ↑ Guarani language, alphabet and pronunciation (http://www.omniglot.com/writing/guarani.htm). Omniglot.com. Alirita 2015-02-14.
47. ↑ Esperanto, Sample text in Esperanto (http://www.omniglot.com/writing/esperanto.htm). Omniglot.com. Alirita 2015-02-14.

Literaturo

El la germana vikipedio

- Antonio Guasch: *Diccionario castellano-guaraní*. Ediciones Loyola, Asuncion 1978.
- Antonio Guasch: *El idioma guaraní – gramatica y antologia de prosa y verso*. CEPAG, Asuncion 1996.
- Wolf Lustig: *Kauderwelsch. Guaraní – Wort für Wort*. Rump, Bielefeld 2005, 2. Auflage.
- Emma Gregores u. Jorge A. Suárez: *A description of colloquial Guaraní*. 1967.
- Anselmo Jover Peralta u. Tomás Osuna: *Diccionario guaraní-español y español-guaraní*. 1950.

- Natalia Krivoshein de Canese u. Feliciano Acosta Alcaraz: *Diccionario Guaraní-Español Español-Guaraní*, Tercera Edición. Colección Ñemity, Asuncion 2006, ISBN 99925-3-160-6.
- Antonio Ortiz Mayans: *Gran Diccionario Castellano-Guarani Guarani-Castellano*. EUDEPA, 1997.
- Antonio Ruiz de Montoya: *Vocabulario de la lengua guaraní*. 2002.
- Mário Arnaud Sampaio: *Vocabulário guaraní-português*. 1986.
- Lino Trinidad Sanabria: *Ñane ñe'ẽ guaraníme* (edición bilinguë guaraní-castellano). 1991.
- Lino Trinidad Sanabria: *Gran diccionario Avañe'ẽ ilustrado: guaraní-castellano, castellano-guaraní*. 2002.
- Tadeo Zarratea: *Gramática Elemental de la Lengua Guaraní*. MARBEN, Asuncion 2002, ISBN 99925-46-21-2.

Pliaj fontoj

Pri la gvarania

- Sebastian Nordhoff: Nomen/Verb-Distinktion im Guarani, ISSN 1615-1496 (https://portal.issn.org/resource/issn/1615-1496), versio en la interreto (http://publikationen.ub.uni-frankfurt.de/frontdoor/index/index/docId/22366) (elŝutita la 17-an de oktobro 2012; retrovita aliloke la 28-an de marto 2016) germane
- Silvio Liuzzi, Pablo Kirtchuk: Tiempo y aspecto en Guaraní, versio en la interreto (http://www.vjf.cnrs.fr/sedyl/amerindia/articles/pdf/A_14_01.pdf) (elŝutita la 23-an de septembro 2012; retrovita aliloke la 14-an de februaro 2015) hispane
- Sebastian Drude: Die Personenpräfixe des Guarani und ihre lexikographische Behandlung, versio en la interreto (http://pubman.mpdl.mpg.de/pubman/item/escidoc:1466231:2/component/escidoc:1466409/Drude%202008%20-%20Die%20Personenpr%C3%A4fixe%20des%20Guaran%C3%AD.pdf) (elŝutita la 25-an de oktobro 2012) germane

Pri Jopara

- Guido Kallfell: Grammatik des Jopara, Gesprochenes Guaraní und Spanisch in Paraguay, Peter Lang GmbH, 2011, ISBN 978-3-631-61923-0

Vidu ankaŭ

- Jopará
- Jezuitaj redukcionoj
- Tupia lingvo
- Lingvistiko
- Listo de lingvoj
- Lingva familio

Eksteraj ligiloj

- Guarani Renda: Dulingva paĝaro gvarania-hispana lingvo pri la gvarania lingvo (http://www.guaranirenda.com)
- http://www.guarani.de
- Guarania Portalo de la Universitato de Majenco (http://www.staff.uni-mainz.de/lustig/guarani)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Gvarania_lingvo&oldid=6581659"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 22:11, 19 apr. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.